

LUCIA




KAJ LA
BLUA
PLANEDO

Marina Jurg

Maribel Pérez







Marina Jurg

LUCIA
KAJ LA BLUA
PLANEDO

kun ilustraĵoj de Maribel Pérez

Antaŭparolo de tradukinto en la anglan:

...Mia nomo estas Anne Agnew kaj mi loĝas en Katalunio, Hispanio. Nederlanda amikino kaj najbaro, Marina, skribis ravan malgrandan libron nomita "Lucia kaj la Blua Planedo", pri la vivo kaj morto de sia filino, Lucia.

Lucia naskiĝis kun metabola malsano, peroksisoma perturbo kaj la prognozo havi tre mallongan vivon. Ŝi vivis 10 jarojn (1997- 2007) en la familia bieno ĉi tie en antaŭaj Pireneoj. Fizike ŝi estis profunde invalida, kun la mensa kapableco de unu monat-aĝa bebo,

Sed, el la vidpunkto de ŝia familio, Lucia funkciis je multaj malsamaj niveloj kaj, vivante kun ŝi, ili rimarkis ke estis io pli en ŝia vivo ol kio verŝajnis.

La rakonto de la vivo de Lucia estas skribita kiel feino-rakonto, la rakonto de princino naskiĝinta sur malproksimega planedo.

Princino Lucia aŭdis pri bela blua planedo, Tero, kaj deziris viziti nin antaŭ ol nia polucio igus ĝin griza. Spite al tio, kion diris ŝia patro ke la diferencoj inter la planedoj igus ŝin nekapabla vidi, aŭdi aŭ eĉ moviĝi, sur la Tero, ĉiuokaze ŝi decidis veni ...

Anne Agnew



Esperantigis: Joan Inglada Roig

enkonduko



Lucia vivis dek jarojn, sufiĉe pli da tempo ol ni iam ajn revis. Sed por mi ŝia vivo estis apenaŭ mallonga blovo de pura aero, ĉar mi sopiris vivi kun ŝi por ĉiam. Ŝia vivo estis nepenetrebla kaj tenera mistero. Dum la memoro estis forta kaj freŝa, mi deziris skribi pri ŝi. Mia amikino Monique sugestis ke mi skribus feinan rakonton kio stimulus mian imagpovon. Kiam la libro estis finita, Maribel, la instruistino de Lucia forigis preskaŭ mil vortojn kaj ornamis ĝin per belaj ilustraĵoj. Mia danko al ambaŭ kaj al ĉiuj parencoj kaj amikoj kiuj havis la bonŝancon dividi la blujn tagojn kun nia malgranda princino dum ŝia delikata vivo.

Marina, la patrino de Lucia

Foje estis bela princino kiu loĝis en tre malproksima planedo kaj kies pli granda revo estis veturi en la Bluan Planedon: en la Teron. Ŝi aŭdis paroli pri ĝiaj riveroj, pri ĝiaj lagoj kaj pri ĝiaj senlimaj maroj, loko kun tiom da akvo ke ĝi donis vivon al ĉiuj specoj de arboj, plantoj, bestoj kaj homoj.

“Pro tio verŝajne oni nomas ĝin la Blua Planedo”, ŝi pensis laŭte.

Sed la princino ankaŭ sciis ke la aferoj ne funkciis sufiĉe bone, tie, en la malproksima Tero. Oni diris al ŝi ke ĝiaj loĝantoj dependis plene de la maŝinoj por fari ion ajn: labori, lavi, vojaĝi, kuiri, paroli... kaj eĉ ludi. Tio postulis fabrikojn, kamionojn, ŝoseojn, kio, kompreneble, produktis multan poluadon.

“Verŝajne finfine oni nomos ĝin la Griza Planedo”, ŝi sin diris tre malĝoje. Kaj antaŭ ol tio okazu, la princino avidis viziti tiun belan mondon. Tiel ŝi decidis peti permeson al sia patro. La princino estis juna, sana kaj tre aventurema sed ŝia patro, la Reĝo, sciis ke vizito en la Bluan Planedon estus tre malfacila kaj danĝera.

– Mia karulino, vi povas veturi ien ajn vi dezirus, sed ne en la Bluan Planedon – diris li, kun reĝa seriozeco.

La princino rigardis sian patron per okuloj tre malĝojaj, tial la reĝo, kortuŝita, decidis kunvoki kunvenon kun la kvar najbaraj planedoj por ke ili donu siajn opiniojn. Tiel organiziĝis granda vespermanĝo kaj, je la fino, la princino povis koni la decidojn de la kvin reĝoj.





La plej maljuna el la monarkoj leviĝis. En la manĝoĉambro regis ektimiga silento. La princino ruliĝis nervoza en sia seĝo, balancis la kruojn kaj metis sian blondan hararon malantaŭ siajn orelojn. Aŭdiĝis seka tuso kaj, post longa paŭzo, tiu reĝo diris solene:

–Laŭ niaj sciencaj saĝuloj, la princino povus fari la vojaĝon en la Bluan Planedon...

Ekaŭdiĝis gajaj kaj aprobaj krioj, kiam la reĝo aldonis:

–Kaj povus vivi tie... Sed ŝi ne povos movi propra-vole iun ajn parton de sia korpo, eĉ la kapon.

–KIAL? –Kriis la princinon, senesperigita.

–Ĉar en la tero estas gravito kaj la aera komponaĵo estas tute malsama al tiu sur nia planedo –respondis tiu maljuna reĝo.

Tuj poste parolis la dua reĝo:

–Ni ankaŭ konsentas ke la princino povas fari tiun longan vojaĝon, sed bedaŭrinde ni malkovris ke en la Blua Planedo ŝi ne kapablos vidi ion ajn per siaj okuloj.

Perlis larmo laŭ la vango de la princino. Nek bluan akvon, nek kolorajn florojn, nek verdajn arbojn, nek brunajn montojn, nek blankajn nubojn... Sed antaŭ ol sekiĝis ŝiaj larmoj, la tria reĝo jam estis preta paroli:

–Ni havas la rimedojn por ke la princino atingu la Bluan Planedon, sed ni malkovris ke tie ŝiaj oreloj ne estos kapablaj percepti iun ajn sonon. La princino pensis ke ŝi jam aŭdis tion plej malbona. Ŝi povus realigi sian revon, sed sen moviĝi, nek vidi nek aŭdi. Ŝi supozis tiam ke kion povus aldoni la kvara reĝo estus sendube ion bonan. Sed ne estis tiel:

–Niaj scienculoj ankaŭ opinias ke la princino povas realigi tiun longan vojaĝon, sed ili estas konvinkitaj ke en la Tero ŝia cerbo ne evoluos normale kaj sekve ŝi ne povos ridi, nek pensi, nek lernos paroli.

Post mallonga kaj dolora silento, tiu respektinda reĝo daŭrigis:

–Krome, la fortaj gravitaj stimuloj de la Tero kaŭzos ke ŝia korpo spontanee kaj senkontrole skuos kaj ke ŝi havos subitajn spirajn haltojn...





La princino sentis kapturnon. Ŝia espero ŝajnis
forbloviĝi. Ĉio estis sonĝo, neebla sonĝo. Ŝi sin sentis nekapabla
fari tiun vojaĝon en tiel rigoraj kondiĉoj.

Tiam ŝia patro staris, kaj, post rigardi ŝin milde, diris al ŝi:

–Nun nur vi povas decidi ĉu vi volas viziti la Teron. Pensu ke via restado tie estos tre intensa kaj malĉacila, kvankam eble ĝi estos ankaŭ mirinda kaj bela. Se vi decidas iri, vi havos tempon por ĝui la aĵojn, vi povos odori la parĉumon de mil floroj, senti nekredeblajn sentojn, ĝui neatenditajn gustojn...

Via homa familio

amos vin multe. Vi sentos ilian feliĉon kaj ilian malĝojon kaj vi instruos ilin esti konsciaj pri aliaj realaĵoj, ne, ĉar simplaj, malpli gravaj. Tra vi ili malkovros ke la plej granda ĝojo devenas el la eblo spiri profunde, manĝi sane, malstreĉi sin aŭ dormi profunde. Kaj krome vi disvolvos alian senson, tiom intensan vivdeziron kiu faros vin senmorta. Aŭ preskaŭ senmorta, pro tio ke en tiu planedo ĉio havas komencon kaj finon. Kaj iun tagon, kiam vi forlasos la Bluan Planedon por reveni ĉi tien kaj okupi mian lokon sur la trono, vi konos la sekreton de kio vere estas grava.

La princino rigardis sian patron per dankemaj okuloj kaj nur kapjesis. La sekvan tagon, la kosmo-ŝipoj estis pretaj por ke la kvar reĝoj reiru al sia planedo. Ankaŭ estis kosmo-ŝipo pretigita por la vojaĝo de la kuraĝa princino, kiu finfine decidis viziti la malproksiman Bluan Planedon.



En Montsec, la montaro de Àger, ĉe la sudaj Pireneoj en Katalunio, vivis paŝtisto kun siaj kaproj. Iun tagon li siestis sub granda verda kverko kiu donis al li ombron la varmegajn tagojn. Lia grego ankaŭ ripozis, ĉar ĝi paŝtiĝis ek de la sesa matene kaj nun la bestoj havis la ventron plena kaj la suno forte brilegis alte en la ĉielo.

Subite la kaproj nervoziĝis. Aŭdiĝis porta vento kaj fluoreskajflugiloj alproksimiĝis rapidaj tra la ĉielo. La kaproj komencis salti teruritaĵ, kio tuj vekis la paŝtiston, ĉar li ĉiam gvate dormis por protekti sian gregon de sovaĝaj hundoj, agloj kaj serpentoj.

Li rigardis supren kaj ridetis. Nur temis pri deltaplano kiu flugis tro malalte kaj pretis surteriĝi ĵus tie. Tuj, la piloto maltrankvile salutis permane. Ŝi timis esti denove persekutita de homo kun forkego, kiel okazis al ŝi iam ajn antaŭe en Anglio. Sed la paŝtisto salutis ŝin amike kaj la kaproj tuj fleksis siajn krurojn sur la herbo por ripozi iom pli. La piloto faldis rapide la deltaplanon kaj iris al la verda kverko kie estis la viro. Ŝi emis koni veran paŝtiston, ĉar en sia lando jam estis malaperintaĵ.

Post monatoj alvenis la vilaĝaj festoj. José, la paŝtisto kaj Marina, la piloto, renkontiĝis denove kaj dancis la tutan nokton. Ili sin sentis feliĉaj, kaj decidis vivi kune en la montaro kie la aero estas pura kaj sana.

Un printempan nokton ili konversaciis kaj ridis sub la ĉielo de la montaro Montsec kiam abrupte la steloj silentigis ilin kaj ili tuj sin sentis minusklaj sub la granda kaj nekonata firmamento. Subite, la steloj multobliĝis kaj unu el ili falis proksime de kie ili estis. Tiu nokto Marina sonĝis ke ŝi naskos bebon.

En la sekvaj monatoj, dum la grego paŝtis tra la monto, la ventro de Marina iom post iom kreskis. Marina kaj José fantaziis pri kiel sana, forta kaj lerta estus ilia bebo, koncipita kaj kreskanta en tiu bela montaro. Ili estus ĉiam kune kaj ĝiaj unuaj ludiloj estus la kapridoj, la ŝtonoj, la branĉoj... kaj, kun la estontaj geŝratoj, ili grimpus por serĉi perditajn kaprojn kaj foje eĉ dormus sub la steloj.

La tempo pasis rapide. La forta vento de aŭtuno blovis kaj la ĉielo estis tiel blua ke ŝajnis nekredebla; ĝi estis impona, kiel la milda kaj rara movado kiun sentis Marina en sia ventro. En januaro alvenis la neĝo sur la montaron Montsec kaj, kune, ankaŭ la bebo.



Kiel ŝalanta kometo, la princino alvenis surteren kaj tuj antaŭ ol ŝia kapo tuŝus la plankon, la akuŝistino kaptis ŝin.

–Bonega kaj tre rapida akuŝo! –kriis la akuŝistino dum ŝi metis la bebon en la brakojn de Marina.

–Ŝi estas belega kaj brila kiel la lumo. Ŝi nomiĝos Lucia –diris ŝiajn gepatrojn vidinte unuafoje ŝiajn okulojn.

La brilaj okuloj de la princino rigardis kurioze ĉirkaŭen.

–Mi povas vidi! Ĉi tio ne estas kion diris al mi en mia planedo –ŝi pensis feliĉa.

La unua afero kiun ŝi vidis estis la granda rideto de Marina, kaj poste la aŝabla kaj observema rigardo de José. Malantaŭ ili ĉio estis blindiga blanka lumo.

–Kaj, ĉu ĉi tio estas la blua planedo...? Kie estas la akvo kaj la blua ĉielo, la verdaj arboj kaj la brunaj montoj? –pensis la princino seniluziigita.

Iom poste, kiam ŝi estis en la lito kun Marina, ĉi tiu flustris al ŝi ĉe la orelo:

–Trankviliĝu, ni ŝrue ŝoriros hejmen.

Tiam Lucia komprenis ke la blanka koloro kaj la intensa antisepaodoro estis transiraj.

–Mi povas aŭdi! La reĝoj eraris! –ŝi pensis surprizita.

lom post iom organiziĝis granda ĝesto ĉirkaŭ ŝia lito. La tuta familio venis koni ŝin, kaj tuj enamiĝis pro ŝia beleco. Lucia estis tre kontenta vidi tiomajn feliĉajn vizaĝojn kaj aŭdi tiomajn ĝentilaĵojn. Ĉio iris bone. Tamen nur estis problemo, ŝi malfacile glutis kaj ne povis trinki la lakton.



Du tagojn

poste, eŭforia José venis kolekti ilin. Sed bedaŭrinde Lucia ne povis foriri, ĉar devis resti en ĝlasa skatoleto por kontroli ŝian koron, ŝian spiradon kaj havigi al ŝi la nutraĵon. José kaj Marina nur povis karesi sian filnjon duonhoron ĉiutage. Kiam Lucia sentis iliajn manojn karesi ŝin, ŝi deziris teni tre forte kaj neniam delasi ilin, sed ŝi ne kapablis, pro tio ke ŝi havis neniun forton, nek en la brakoj nek la kruroj.

Finfine la kuracistoj malkovris ke Lucia suferis gravan kaj malmulte konatan malsanon, kaj la viv-espero estis mallonga. Ĉiame ŝi estus delikata bebo, suferanta konvulsiojn kaj spirajn problemojn. Kaj tio kio estas pli malbona estis ke la kuracistoj povis fari nenion por plibonigi ŝian viv-kvaliton... Tiel, konklude, la reĝoj ne eraris.

–Lucia, ni iras hejmen kaj tie ni spiros la puran aeron de la monto!” –Diris Marina kun kor-inklino.

Lucia vidis kiel la lipoj de sia patrino moviĝis, sed nur aŭdis la fortan zumadon de miloj da abeloj dancantaj. Ĝus elirinte el la hospitalo José estis tiel feliĉa kaj emociita kaj parolis tiel laŭte al Lucia ke ŝia korpo subite forte ekskuis.

Sed alvenis la momento koni la Bluan Planedon kaj liaj gepatroj karesis ŝin kaj kisis ŝin klopode malstreĉi ŝiajn muskolojn.

Nun Lucia vojaĝis trankvila ĉe la sino de Marina. Ŝi malkovris ion pli: ŝi nur povis aŭdi la fortajn kaj gravajn kriojn, kiel tiuj de sia patro. Poste ŝi rigardis tra la aŭta fenestro kaj vidis kiel la urbo iom post iom vanuis, ĝis finfine aperis la montoj.

Un matenon,

José kaj Lucia ekskursadis tra la monto. Ŝi iris en varmeta mantelo, pendanta de lia kolo.

José rigardadis Lucia-n kaj ĝuis pri ŝia trankvila rigardo. Li tre amis sian princinon. Lucia ankaŭ estis tre feliĉa kun sia patro, pacienca homo kaj observanto kiu komprenis ŝin tre bone. Kiam ŝi singultis aŭ havis ventro-doloron, li ĉiam sciis kiel trankviligi ŝin.



La bluo de la ĉielo brilis en ŝiaj okuloj kaj ambaŭ ĝuis intense tiun momenton. Subite, ĉio fariĝis nigra kaj Lucia serĉis aeron por spiri. Ŝiaj okuloj deturniĝis kaj ŝia korpo kuntiriĝis. Ŝi poste rimarkis multajn kisojn, karesojn kaj mildajn vortojn. Ŝi tiam fermis kaj malfermis la okulojn refoje, sed ŝi jam ne povis vidi ion ajn.

Kiam ili alvenis hejmen, ŝiaj gekuzoj Jessica kaj Daniel atendis ŝin por la bano. Jessica flegis ŝin ĉiam tre kor-inkline. Tiun tagon ŝi ŝin sekigis milde, ŝin masaĝis, surmetis al ŝi la piĝamon kaj metis ŝin sur la genuojn por spekti poste, ĉiuj kune, videobendan filmon.

–Aaaaaaaaahhhh –murmuris Lucia.

Ŝi ne vidis Jessica-n, nek aŭdis la filmon, sed sentis pli ol neniam ĉiujn el la emocioj de la momento..

lun tagon kiam Lucia praktikis siajn ekzercojn sur la genuoj de Marina, mem rimarkis ion malsama, ŝi rimarkis movadojn en la ventro de sia patrino. Ŝi ŝatintus kure eliri por ekspliki la novaĵon al ĉiuj aliaj, sed ne kapablis. Kaj ĵus post ŝia unua naskiĝtaga datreveno, naskiĝis, tre malgrandeta, ŝia frato Ángel.

Marina akompanis la infanojn preskaŭ ĉiutage sur la montaron Montsec, kie estis ilia patro kun la kaproj, kaj kune ripozis kuŝe apud la florplena rosmareno. Lucia aŭdis la fortajn kriojn de Ángel kiam li malsatis kaj liajn pepadojn kiam li estis sata.

La tempo pasis kaj Lucia observis la ludojn de sia frateto. Ŝi sentis kiel la bastonoj moviĝis en la aero por ĉasi aprojn, kiel tremis la tero kiam tiuj grandaj bestoj ŝaladis sur la plankon...

Kuŝanta sur la monto ŝi ankaŭ malkovris kiel la vento ludis kun la odoroj. Ŝia nazo odoris la pinan, la timianan, la muskan kaj la rosmarenan aromojn. Lucia rimarkis kiel la monto dancis ĉirkaŭ sin kaj sentis la sunradiajn brilon inter la folioj de la arboj.

lun postlernejan vesperon, ili promenis ĝis tre belan lokon, ne tre for de la vilaĝo. Verda angulo kiel oazo, kun pepanta ŝonto, ĉio ĉirkaŭita de la montaro Montsec.

–Aaaaaaaaaaahhhh –diris Lucia.

Ŝi rimarkis ke ĉi tiu estis la perfekta loko por la domo de siaj revoj, ampleksa loĝejo kaj sen ŝtuparoj por ne stumbli, kun facila enirejo kaj sufiĉe larĝa balustrado por pendigi hamakojn. Ángel plene konsentis kaj entuziasme aldonis:

–Ĉi tie estas multe da spaco kaj paĉjo povos alporti siajn kaprojn, tiel ke ni ĉiutage nin vidos.

Tuj kiam ili aĉetis la bienon, ili plantis fruktajn arbojn kaj vitejon, ili kultivis grandan legomĝardenon apud la fonto kaj konstruis ampleksan gregejon por la kaproj. Ili poste komencis konstrui la hejman palacon, sed antaŭ ol ili finis ĝin, Lucia denove malkovris novan vivon en la ventro de sia patrino.

Marco kreskis kun la kaproj en la bieno. La unuaj naskitaj kapridoj tie havis lian saman aĝon, kvankam li ne multe atentis ilin, ĉar li preferis dormi apud Lucia. Ĉiam estis la du infan-veturiĵoj kune, en la gregejo, en la legomĝardeno kaj en la nova domo.

Kiam Marco komencis kvarpiediri portis al Lucia ĉion kion li trovis en siaj esploradoj kiel helikojn, sablon, bombon-stangetojn...

Iun tagon Ángel diris al siaj gepatroj ke la infanoj de la lernejo demandis lin pri tio kio okazis al Lucia, kaj ke, ekde tiu simpla demando, li rimarkis ke sia fratino diferencis. Nun estis surprizita kaj kontenta pro tio ke Marco sciis kvarpiediri, ridi kaj balbuti vortojn.



La someraj monatoj estis la plej bonaj. Ili oĝtis en la naĝejon, kie ŝi pluse malstreĉis sin kun sia kapo sur plenlovebla kuseno kaj faris sulkojn en la akvo kiel motorboato.

Lucia ankaŭ ĝuis la aŭtunajn ruĝecojn kaj oranĝecojn kaj la vintran blankecon, kvankam tiam ŝi kutime malvarmiĝis. Bonŝance ke ĉiam alvenis la verda kaj freŝa printempo, kun la kantoj de la kukolo kaj la najtingalo. Iliaj vibrantaj ĉarmatenaj koncertoj konsolis Lucia-n.



Tiel, la sezonoj iom post iom pasis kaj, kun
ili, la jaroj kiujn Lucia elspezus kun sia familio.





Ĉe ili la manĝoj ĉiam estis festaj. Ili pasis senhaste, parole kaj gustume pri la legomĝardenaj produktoj. Ili ĉiuj same manĝis, kvankam piste por Lucia sidanta sur sia trono: la genuoj de Marina.



Post vespermanĝi, ŝi invitis ilin promeni tra la stelaro. En la ŝebla lumoj de la nokto, Lucia kaptis la manojn de Marina, ŝi tiun de José kaj li tiujn de Ángel kaj Marco. Kaj pli rapide ol raketa rajdo, ili flugis kaj turniĝadis tra la ĉielo. Tiam, Ĥer kaj la montaro Montsec iĝis malgranda punkto proksime de la Mediteraneo kaj, tuj, la Blua Planedo iĝis nur malgranda pilko. Malpezaj kiel plumoj ĝoje rondveturis kaj desegnis figurojn. Ili ne timis, kaj, gviditaj de Lucia, alvenis ĝis la Granda Ursino kaj la Polusa Stelo. Kiam la knaboj dormemis, Lucia portis ilin ĉiujn denove hejmen, kaj ili surteriĝis milde en siajn litojn.



Tri tagojn

semajne, Marina ŝarĝis la infan-veturilon en la malantaŭan parton de la aŭto. La infanoj kuris kun siaj tornistroj por supreniri unue.

–Unue Lucia! –diris Marina.

Ŝi tiam metis Lucia-n en ŝian mantelon en malantaŭan sidlokon, Ángel sidiĝis ĉeflanke kun la piedoj de Lucia sur siaj genuoj kaj Marco supreniris antaŭen sur sian seĝeton. Ili tri iris al la lernejo kaj la kamparaodoro miksiĝis kun tiu de la kraĵoj, la ciferoj kaj la literoj. Kaj por Lucia kun la novaj odoroj de la papero, la farbo kaj la gluo.

Kiam ŝi atingis sian lernejon, en Balaguer, supreniris la ramplon kaj en la eniro atendis ŝin ŝiaj kunuloj. Lucia ĉeestis “la klason de la nuboj”. Klaso kun korka planko, koloraj spongoj, kusenoj, kaj kurtenoj en la enirejo kiuj tiklis la vizaĝon.

Iujn tagojn ŝi laboris per siaj manoj kaj siaj piedoj ĉar oni devis pentri kaj sperti per farbo, rulŝtonoj, folioj, koloraĵoj, kaŝo, faruno... Aliajn tagojn ŝi balanciĝis, turniradis kaj moviĝis super la nuboj, vojaĝis en trajno, en aŭto aŭ sur heliko. Sed ŝi ne revis, ŝi laboris kaj faris siajn ekzercojn. Ŝi poste preparis plenan glason de suko dum sentis la vibron de la premilo. Ĉi estis bonega kaj, kun sukero, ankoraŭ pli bona.

Ŝi ankaŭ sportis. Vestita per sia sport-kostuma uniformo, ŝi partoprenis en ĉiuj kuradoj per sia rapida rulseĝo.



La lerneĵ-teatra verko

estis la plej bona parto de la teama laboro. Kiel ĉiujare, la gepatroj, la gefratoj, la geavoj kaj la geamikoj sidis sur la mildaj veluraj sidlokoj. Oni elŝaltis la lumojn kaj enŝaltis la fokusojn.

La orkestro ekludis, dum iu voĉo rakontis la historion kaj la aktoroj aperis en la scenejon. Lucia serpentumis en "La Gulliveraj vojaĝoj" kaj eliris en la scenejo kun sia pupo. Ŝi estis tre atenta, ĉar ŝi sciis ke ĉi tiu tago estus unu el siaj lastaj tagoj en la Blua Planedo.

Post la granda aplaŭdo de la publiko, ŝiaj fratoj fiere portis la ĉefrolulinon en la aŭton. Sed Lucia estis tre laca, ŝia koro kaj ŝiaj pulmoj jam ne povis labori pli. Iun vitran nokton, dum ŝi varme dormis inter siaj gepatroj, ŝi milde foriris el la Blua Planedo.

Kiam Marco iris al la lito de siaj gepatroj, li kredis ke Lucia daŭre luktis kontraŭ la aproj, sed Ángel tuj rimarkis ke Lucia ĉesis ludi por ĉiam.

Eliris la suno kaj la tuta montaro Montsec vekiĝis kun la novaĵo pri la foriro de Lucia.

Alvenis la momento adiaŭi. La blankaj rozoj, la paperaj manoj, la desegnoj, la larmoj, diris ĉion:

"Adiaŭ, sed ĉiam kunaj"

Tio kion unue

ĉaris la princino reveninte en sian planedon estis kure ĵeti sin en la brakojn de sia patro. Subite, rigardante sian sopirintan filinon, la reĝo rimarkis la malĝojon en ŝia vizaĝo. La princino diris al li:

–Jes paĉjo, estas tre bele reveni hejmen, sed mi jam tiom sentas ilian mankon...

– Ĝi estas tute normala pro tio ke vi estis tiom feliĉa kun ili –respondis al ŝi ŝia patro–. Sed ne maltrankviliĝu, vi vivas en ili. Ili memoros vin per laodoro de la floroj, per la steloj de la nokto kaj per la bluo de tiu akvo kiun vi tiom amis; hejme, en la lernejo, en Montsec, en Nederlando... Ĉiuj pensos pri vi kun gajeco kaj daŭre sentos vian dolĉan silenton.

La vortoj de ŝia patro provokis grandan rideton ĉe sia bela vizaĝo kaj jam la princino komencis entuziasme paroli pri siaj fratoj:

–Ili estis miaj plej bonaj amikoj. Mi lasis ilin ĉari kuradon per mia infanveturilo, ĉar kiam mi ĉartis malbone, ili lasis min trankvila kaj ĉlegis min. Kaj tio pli grava, ili sciis atendi...

Sen halti nek por spiri, ŝi daŭre parolis pri siaj lernejoj amikoj, pri la ekskurso al ŝia domo por vidi la kaprojn kaj gustumi ilian lakton, pri la afrikaj tamburoj kiuj vibrigis sian koron... Poste, iom pli malĝoja, ŝi aldonis:


–Sed surstrate la homa konduto estis malsama.
La homoj rigardis min strangmaniere kaj iliaj okuloj sekvis min ĝis ili ne povis turni pli la kapon.
Ĉu vi opinias ke ili sciis ke mi estis el alia planedo?"


Al tio la reĝo respondis:

–Ne. Kaj verŝajne ili nek komprenis kiel vi ĝuis pri la gustoj, pri la odoroj, pri la lumo de la suno, pri la sana aero de la montaro kaj, ĉefe, pri la kompanio de tiuj kiuj amis vin... Vi vivis grandajn spertojn mia princino kaj, pro tio, estas la lasta fojo kiam mi nomas vin tiel.


Tiam, la reĝo kaptis malrapide la oran kronon de sia kapo kaj metis ĝin, kun respekta gesto, sur la belan kapon de Lucia.













Ben Lucia